AE203

# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO KAJ NOVZELANDO**

http://beta.visl.sdu.dk/lingvohelpilo/

**PLENUMITA 07/02/2015 Ducent tria eldono 07/02/2015 SENDITA (unua eldono 20/09/2011)**

**Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;**



**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Nicole Else**



SENDATA AL 275 La informa kaj noma paĝoj reaperos nur en la dekaj eldonoj

**Brunaj literoj signifas reuzatan sed gravan informon** **ABC malnova**

Nigraj literoj signifas novan aŭ ĝisnunigitan informon **ABC nova**

Ctrl+alklaku la verdajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Esperantajn ligojn

Ctrl+alklaku la bluajn lokojn, aŭskultu, rigardu la Anglajn ligojn

**Pasintaj numeroj de 'A E'** http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

## Esperanto Pocket Textbook estas <u>PROPAGANDILO</u>

Uzu, fordonu, semu Esperanto-semojn. Ne lasu kopiojn sur bretoj.

Du pecoj de A4 papero bezonataj por presi la 32-paĝan libreton http://aea.esperanto.org.au/sxlosilo/?lang=eo



## Estontaj kompetentaj Esperantistoj

**aŭskultas la retradion (Esperantujo) ĉiun tagon**

**http://esperantaretradio.blogspot.co.at/?view=magazine**

**Metu la adreson en viajn preferatajn programojn kaj tage Klaku, Aŭskultu, Spertiĝu**

## 57. LA GRAMATIKO DE ESPERANTO

### LA PREPOZICIOJ. B.



Dum epiteto estas kutime unu vorto, la suplemento difinas la substantivon (kaj la verbon en formo de adjekto) ne rekte per unu vorto, sed per prepozitivo, kiu konsistas kutime el substantivo aŭ, kelkfoje, infinitivo, kun antaŭa prepozicio. La prepozicio ligas la difinantan prepozitivon al la antaŭa substantivo aŭ infinitivo (aŭ verbo, se ĝi estas adjekto). Ekz. "La aŭtomobilo <u>de mia onklo</u>", "Retroveni <u>pro la pluvo</u>", kaj "Ni promenas <u>por resti sanaj</u>". La speco de la difino dependas de la prepozicio uzata kaj povas indiki multajn

rilatdifinojn, ekz. lokon (“Hundo sur la manĝskatolo”), tempon (“La manĝo dum la mateno”), tialon (“Hejmresti pro la pluvo”), kaj plurajn aliajn pro la pluraj prepozicioj en lingvoj.

Oni povas ŝanĝi la suplementon al plena frazo, metante la verbon “esti” antaŭ la prepozitivon, ekz. “La flago sur la monto” al “La flago estas sur la monto” kaj “La retroveno pro la pluvo” al “La retroveno estis pro la pluvo”. Sed tion oni ne povas fari, se la unua parto de la kunsuplementa frazo estas verbo: “Foriri pro la pluvo” kaj “Li grimpis sur la monton”.

Marcel Leereveld.

# Niaj Legantoj Komentas



★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Kara Roger

Mi ĵus trovis la rakonton pri nia Merlo. Mi tre ĝojas pri tio, kaj mi esperas, ke la raporto ĝojigas viajn estimatajn legantojn.

Kun koraj salutoj al Aŭstralio,

Hermann Kroppenberg

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Kara Roger

Dankegon pro la eldono de la anonceto pri la klubo de Noumea en la lasta numero. Tamen ni bedaŭras ke vi ilustris la tekston per la flago de la sendependa partio. Almenaŭ ĝis 2018 kiam okazos la referendumo pri la sendependeco, nia lando nomiĝas NovKaledonio, ne Kanaky, kaj nia flago estas tiu de Francio.

Kore salutas. Ivan

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Kara Roger !

Mi tre ĝuis la legadon pri la historio pri la Merlo, kies vivon savis nia germana samideano. La rakonto estas kaj kortuŝa kaj bela. Multajn dankojn al Hermann Kroppenberg.

Plej amike, Bob Felby

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

**Sendu viajn fejsbukajn Esperanto-novaĵojn ankaŭ al la Novaĵletero.**



## Novaĵoj pri la Esperanto-Doma Gastdormejo

Sendu ĉiujn petojn por resti ĉe la gastdormejo al **LA SEKRETARIO** per retmesaĝoj al: gymea@hotmail.com; rspring@tpg.com.au; kaj nsw@esperanto.org.au;

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

Karaj samideanoj. De la 14a ĝis la 24a de Januaro mi pasigis belajn somerajn tagojn en Sidneja E-domo, kun mia amikino. Mi ĝuis la diversajn lokojn de Sidnejo. Vere Sidnejo havas multe da vidindaj lokoj.

Mi elkore dankesprimas al Roger kiu bonege prizorgis nin. Eĉ jam dum la Kongreso en Melburno, li donis la ŝlosilon de strata pordo, kaj facile ni povis eniri en la doman korton.
Kaj mi ankaŭ dankas al la samideanoj de Sidnejo, kiuj bone gvidis nin kaj helpis nin.
Mi ege miris ke ili vigle agadas por Esperanto malgraŭ siaj aĝoj.
Ankaŭ mi invitas vin, samideanojn de Sidnejo, al Koreio.
Amike via Hyon-Suk (Jesa), Korea samideano.
(Tiuj gastoj lasis la lokon treege pura kaj en bona ordo. Dankon)

★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★★

# Esperanto-Domo Sidnejo



Unua de Februaro 2015:
Entute 21 homoj ĉeestis en Esperanto-Domo.
Unue la aferkunveno okazis de 11atm ĝis la 1 ptm en la Angla.
Poste estis manĝo, kaj je la 2a komenciĝis la paroletoj en Esperanto. Ili daŭris ĝis 3ptm. Tiam estis tempo por pli da manĝado, babilado, kaj fotado ĝis finfine la domo fermiĝis je 4ptm. Estis bona Esperanta tago.
Venu al la venonta aferkunveno kiu okazos la unuan de Marto.



Kara Roger, Jen foto. Mi esperas, ke vi ŝatas ĝin! Nicole Else

# Vizito al la Centra Marbordo kaj Sidnejo - Terry Manley, Armidalo



Sabaton la 31an de Januaro mi alvenis al la domo de Jo kaj Alan Turvey ĉe la Centra Marbordo por tranokti tie. Alan kaj Jo havis alian gaston Maruŝka el la Ĉeĥa respubliko kaj ni ĉiuj ĉirkaŭpromenis la grandan ĝardenon rigardante la florojn kaj legomojn kreskantajn tie. Maruŝka kolektis kelkajn por sia parolado la sekvantan tagon pri medicinaj plantoj.

Sabatvespere estis tre interese en la Turvey-a hejmo. Estis la nokto de la Azia Piedpilka finalo. Kaj kiu konkursis? Aŭstralio kaj Koreio! Do kia finalo! Ĉiun fojon kiam Aŭstralio gajnis Alan saltis de la seĝo kriante ĝoje. Jo iom korpeze sinkis en la sofon. Sed ĵus antaŭ la fino Koreio gajnis kaj Jo saltis ekstaze. Alan, kapo en manoj provis eltiri la hararon. Do la ludo daŭris en kromtempo. La filo de Jo kaj Alan, Erik kuŝis sur seĝo senesprime, kaŝanta kiun li subtenis. Aŭstralion aŭ Koreion? Meze de la kromtempo Aŭstralio refoje gajnis kaj refoje Alan dancis sur la meblaro dum Jo ploris sur la sofo. La fina periodo estis tiel ungmordiga. Koreio daŭre atakis la Aŭstralian flankon sed je la fino ne povis venki.

Mi malofte spektas sporton televide sed devis konfesi ĉifoje estis ege interese. Ĉu pro la gimnastikoj de la sportistoj en la ludo aŭ tiuj en la sidĉambro?

Dimanĉe mi veturis trajne kun Alan kaj Maruŝka al Esperanto-Domo kie mi ĉeestis la EFNSK-an kunvenon, tagmanĝon kaj paroladojn posttagmezajn. Estis inspire esti inter Esperantistoj kaj iom babili denove. Mi aparte ĝuis la parolojn de Nicole, Rainer kaj Maruŝka. Mi lernis iom pri la Kongreso en Melburno de Nicole, iom pri la agado de Rainer je mallongaj filmoj kaj iom pri medicinaj plantoj de Maruŝka. Mi jam uzis du aŭ tri el la plantoj kiujn Maruŝka montris kaj havas personan sperton pri ties efiko.

Mi dankas al EFNSK pro la dispono de la gastĉambro, mi kaj mia filino Elissa pasigis du noktojn tie kaj de tie estis tre konvene iri al la urbocentro kaj fine al la aviadilhaveno je Marda mateno por ĝislai mian filinon, kiu flugis al Novzelando por labor-ferio.
Terry Manley



# La Melburna Esperanto-Klubo



kunvenas ĉiujn lundojn, 6.30ptm ĝis 8.30ptm
ĉe Ross House, 247 Flinders Lane.

"La Melburno-Esperanto klubo rekomencis la lundajn kunvenojn pasintan semajnon. La dek unu ĉeestantoj estis Marcel, Ken, Karlo, Jennifer, Esther, Tristan, Joanne, Peter, Jean, Heather kaj Charles kiu vizitis el Adelajdo. Ni ĉiuj rakontis kion ni faris dum la festa sezono kaj post la tepaŭzo Marcel parolis pri neologismoj kaj kiel eviti ilin.
Kiel kutime, ni renkontiĝos ĉiun semajnon ĉe Ross House, 247 Flinders Lane, Melbourne, je 6.30 ptm. Heather"



# Esperanto-Domo Sidnejo

Merkredon la 4an de Jan venis Roger Springer kaj Margaret Chaldecott kiuj laboris farante ĝeneralajn oficejajn/domajn taskojn kaj Ian Wylles kiu ankaŭ helpis en la arĥiva ĉambro. Dum sia restado en la gastdormejo, Terry Manley ordigis multajn gazetojn por la arĥiva ĉambro kaj riparis tri difektitajn kranojn. Dankon



# La Adelajda Esperanto-klubo.



La unua ĉi-jara klubkunveno en Adelajdo okazis merkrede, la 5-an de februaro. Ĝi estis samtempe la jarkunveno. En 2014 okazis nur 8 klub-vesperoj, sed abundis la kromaj aktivaĵoj. Nuntempe ni preparas nian tradician Vintran kursaron, kiun ni intencas okazigi netradicie ekster Adelajdo. Planata estas ankaŭ Lingva festivalo en la laborloko de Sandor: Thebarton Seniors College.
Amike, Katja Steele

# La Esperanta televido "Globeto"

Karaj geamikoj,
Mi ĵus spektis tre viglan kaj interesan intervjuon kun Martin Schäffer, kaj mi pensis, ke vi ankaŭ volus sperti ĝin.
http://youtu.be/zqbqsSMMLQg
Ĉion plej bonan! Amike Betty Chatterjee
Sendis al AE, Bob Felby




"Globeto Intervjuas" estas serio de dekkvin-minutaj filmoj de la Esperanta televido "Globeto", kies celo estas paroligi konatajn Esperantistojn, aktivulojn, artistojn, aŭ iun ajn Esperantparolanton kiu havas ion interesan por diri. Ĉi tiu supra epizodo enhavas intervjuon kun la Ĝenerala Sekretario de UEA (Universala Esperanto-Asocio), Martin Schäffer. Bonvole spektu ĝin, lasu vian opinion sube, kaj dissendu ĝin al viaj E-geamikoj ĉirkaŭ la mondo. Amike, Fabjo.

# NASK: Kiel mi pasigis mian someran ferion

Charlotte MANN
Jen interesa artikolo verkita de 17-jara junulino kiu loĝas en Kanado.
http://bulteno.esperanto-usa.org/2014/4/30-nask.html
Amike, Nicole

# AEA Informas

## Aŭstralia Esperanto-Asocio

ACN 121 495 789 C/- G.P.O. Box 2122, Melbourne 3001

**2015-02-05 AEA raportas:**

Nian lastan Skype estrarkunvenon (05/02/2015) ĉeestis:
Heather, Indrani, Joanne, Jonathan kaj Sandor kaj ankaŭ Ilia kaj Iyan el Indonezio iomete

*** VENONTA KOMUNA KONGRESO EN BANDUNG (INDONEZIO) – PASKO(MARTO) 2016**

Ilia kaj Iyan el Indonezio klarigis al ni ke ili komencis serĉi taŭgan lokon en Bandung.
Ni esploris la inviton de "gravulo(j)" kaj la daton (23/3 – 28/3/2016)
Joanne komencos kunmeti komunan flugfolion.

*** AE 200-A ELDONO DE AŬSTRALIAJ ESPERANTISTOJ**

Ni (iomete malfrue) gratulas Roger Springer pri la 200-a eldono de "Aŭstraliaj Esperantistoj". Li multe kontribuis al la senĉesa informfluo inter ni kaj vere garantias ke ni legas ion pri Esperanto en Aŭstralio ĉiun semajnon.

*** VINTRA KURSARO TRA AŬSTRALIO**

Sandor proponis esplori la ideon havi kelkajn vintrajn kursarojn dum la longa semajnfino en junio samtempe. Ni ankaŭ povas komuniki inter la kursoj pere de Skype.
Ni pensu pri la ideo.

*** ESK**

Bedaŭrinde David Ryan el NZ ne povis ĉeesti la kunvenon.
La venonta Skype estrarkunveno okazos jaŭdon, la 26-an de feb 2015, je la 19:00 (18:30)

Heather, Indrani, Joanne, Jonathan, Sandor

La venontaj Skype kunvenoj estos jaŭde 26/02, 19/03, 09/04, 30/04, 21/05, 11/06, 02/07, 23/07

| Lokaj Aŭstraliaj Esperanto-Kluboj **Listigitaj en la AEA ret-paĝoj kaj Aliaj** | Vidu AE184 | Vidu AE185 | Vidu AE186 | Vidu AE187 | Vidu AE188 | Vidu AE189 | Vidu AE190 | Vidu AE191 | Vidu AE192 | Vidu AE193 | Vidu AE194 | Vidu AE195 | Vidu AE196 | Vidu AE197 | Vidu AE198 | Vidu AE199 | Vidu AE200 | Vidu AE201 | Vidu AE202 | Vidu AE203 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| AEA informas | xxxx | AE185 | xxxx | AE187 | xxxx | AE189 | xxxx | AE191 | xxxx | AE193 | AE194 | AE195 | AE196 | xxxx | AE198 | AE199 | AE200 | xxxx | xxxx | AE203 |
| Brisbana Esperanto-Societo | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Brisbana Esperanto-Kafo-Klubo | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Centra-Marborda Esperanto-Klubo | xxxx | AE185 | AE186 | AE187 | xxxx | xxxx | xxxx | AE191 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Esperanto-Federacio de Nov-Sud-Kimrio | AE184 | AE185 | xxxx | AE187 | xxxx | AE189 | AE190 | AE191 | AE192 | AE193 | AE194 | AE195 | AE196 | AE197 | xxxx | xxxx | xxxx | AE201 | AE202 | AE203 |
| Esperanto en Sudaŭstralio | AE184 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE189 | xxxx | AE191 | xxxx | xxxx | xxxx | AE195 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE203 |
| Esperanto-Federacio de Viktorio | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE196 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Esperanto -Kafo-Klubo De Kanbero | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Esperanto-Ligo de Okcident-Aŭstralio | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE192 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Esperanto-programo de 3ZZZ Aŭstralia | xxxx | xxxx | xxxx | AE187 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE192 | xxxx | xxxx | AE195 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Manlia Esperanto-Klubo | AE184 | AE185 | AE186 | xxxx | AE188 | xxxx | AE190 | xxxx | AE192 | xxxx | AE194 | xxxx | xxxx | AE197 | xxxx | xxxx | xxxx | AE201 | xxxx | xxxx |
| Melburna Esperanto-Asocio | xxxx | xxxx | AE186 | xxxx | AE188 | AE189 | xxxx | AE191 | xxxx | xxxx | AE194 | xxxx | AE196 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE203 |
| Melburna "Meetup" Grupo | xxxx | AE185 | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | AE202 | xxxx |
| Tasmania Esperanta Societo | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Toowoomba Esperanto-Societo | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Torkia Esperanto-Kafo-Klubo | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx | xxxx |
| Klubo de Noumea (Nov Kaledonio) | | | | | | | | | | | | | | | | | | | AE202 | AE203 |

**"Informu AE, se estas eraro en la listo" rspring@tpg.com.au**

**"Ĉu via klubo funkcias?" Sendu informon.**